



Esperanto en Danio

21-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2014



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.


Limdato por la venonta numero:

01.05.2014

Enhavo

Pasinteco kaj estonteco.....	3
Mesaĝo de la prezidanto de UEA.....	4
Al kongreso en Parizo 1914....	5
Jubileo en Helsingborgo.....	9
DEA-jarkunveno 26-27 de aprilo.....	10
Kopenhagaj okazontaĵoj.....	11
Miaj Pensoj pri la Lingvo Esperanto.....	12
Unuigi la Homaron Tutmonde	13
Komento de la redaktoro.....	14
Alvoko pro la Internacia Virina Tago 2014.....	16
Grandioza reklamo por Esperanto.....	18

Pasinteco kaj estonteco



Ni eniris la jaron kiu sin prezentas kun tragikaj rememoroj per tio ke eksplodis la unua mondmilito en 1914. Pluraj libroj pri tiu temo estas jam eldonitaj. Ankaŭ ni, trarigardante nian revuon de tiu tempo, trovis raporton de dana samideanino kiu tre vive rakontas pri la tagoj en Parizo kie ŝi alvenis por ĉeesti la Universalan Kongreson. Cetere oni nur registras la fakton ke la milito estis deklarita, sed kion signifas

tio, por homoj kiuj hazarde trovas sin en alia lando kiu subite fariĝas malamika? Pere de ŝia raporto ni povas tralegi kaj travivi la malfacilaĵojn kiujn travivis la kongresantoj, kiuj jam alvenintaj al Parizo kelkajn tagojn antaŭ la malfermo de la kongreso, ĝis ili denove povis revidi sian landon. Ŝia raporto estas ege detala, kaj mi rekomendas ĝian legadon.

Ĉi-jare ni havos ankaŭ la eblecon rememori la etoson de nia movado dum la dua mondmilito, pere de la prelego de Ulrich Lins dum nia jarkunveno, kiel oni povas legi en la programo. Bedaŭrinde oni povas ankaŭ konstati ke ofte oni ne lernas de tiuj tragikaj eventoj, kaj la historio plenas de okazaĵoj kiuj ripetas sin senĉese.

Rigardante antaŭen mi konstatas ke nia novelektita prezidanto de UEA esprimas pensojn pri renovigo de la movado en la direkto, kiu dum jaroj estis neglektita, sed kiu fakte estas la sama kiel Zamenhof deziris. Li faras du ŝlosilajn demandojn: Kia movado ni fakte estas? Kaj kiel evolui al movado, kiu povas ŝanĝi la mondon? Temas pri nia celo, kaj mi povas konstati ke ni jam orientiĝis al tiu deziro, ŝanĝante la celon de nia statuto jam en 2011. Pri movado por daŭripova evoluo vi povas legi lian artikolon kiun ni publikigas en tiu-ĉi numero de nia revuo. Ankaŭ la artiokolo de nia membro Ana Røssum tuŝas tiun temon.

Ileana Schröder

Mesaĝo de la prezidanto de UEA

Kio estas Esperanto? Jen la neevitebla demando, al kiu ĉiu esperantisto devas ade respondi, ĉu en disaj konversacioj, ĉu en la privateco de la propra cerbo. Ni ĉiuj konas diversajn pretajn formulojn – “lingvo internacia”, “lingvo neŭtrale homa”, “dua lingvo por ĉiuj”, ktp. – tradicie uzatajn por tiaj klarigoj. Komence de la jaro 2014, eble venis tempo rigardi la aferon el iom pli radikala vidpunkto.

Lingvo kun interna ideo – tiel Zamenhof priskribis nian aferon. Sed eble pli trafa estas la iama propono de Helmut Welger, ke temas pri *ideo kun interna lingvo*. Ideo samtempe pli vasta kaj pli intima, ol vortaro kaj gramatiko, ĉar ĝi koncernas nian identecon – nian homan eston.

Laŭ tiu vidpunkto, ni disvastigas unue kaj ĉefe ne lingvon, sed homaranecon. Temas pri la sento kaj sperto, ke oni mem aktive partoprenas en iuspeca tutmonda kulturo – ne simple kiel konsumanto aŭ kliento, sed kiel kunkonstruanto. Tiun senton dividas sendube dekoj da milionoj da homoj tra la mondo; inter ili, multaj apenaŭ (aŭ neniam) aŭdis pri Esperanto; multege malpli eklernis ĝin. Ili estas, tamen, en profunda senco niaj samideanoj.

Por fariĝi amasmovado, ni devos do lerni paroli kun tiuj homoj. Tio signifas ankaŭ lerni aŭskulti ilin. Ni alportas homaranecan rigardon al la lingva sfero; ni elserĉu kaj akceptu homaranecajn kontribuojn en aliaj sferoj. La fakto, ke UEA jam de 65 jaroj emfazas la ŝlosilan gravecon de la homaj rajtoj en nia laboro por Esperanto, estas modelo de tia evoluo; sed ni ne imagu, ke tie jam finiĝas niaj devoj.

La ĉi-jara Universala Kongreso en Bonaero invitas dialogon kun ĉiuj aktivuloj por daŭripova estonteco – koncepto kiu plivastigas la homaranecon por inkluzivi ĉiujn samplanedanojn, homajn kaj aliajn. Ke daŭripova mondo devas esti ankaŭ homaraneca mondo, verŝajne neniu el ni pridubas. Tamen, kiel evolui en tiu direkto – jen defio, kiu nun okupas registarojn kaj neregistarajn organizojn tra la mondo, kaj devus pensigi ankaŭ nin.

Esperanto: lingvo por daŭripova mondo. Por ke tio ne estu nur frapfrazo, ni devas labori por kompreni ĝian amplekson, ĝiajn implicojn. Ni devas fariĝi movado, kiu edukas homojn en tutmonda skalo pri la profunda rolo de la homaj lingvoj en la atingo de justeco socia, ekonomia, kaj eĉ ekologia. Kaj kie povas dialogi ĉiuj, kiuj laboras por tia mondo.

En tia kadro, ni ja rajtos konsideri nin amasmovado.

Mark Fettes

Al kongreso en Parizo 1914

Artikolo el “Esperanto-Raporto” n-ro 9-10, aŭgusto 1914

Supozeble estas nun ĝenerale konate, ke la Deka Universala Kongreso, kiu devus okazi en Parizo 2-10. de aŭgusto, kaj pri kiu ni atendis grandan sukceson, ne okazis pro la malfeliĉa milito.



Mi vojaĝis al Parizo semajnon antaŭ la malfermo de la kongreso, ĉar kvamkam la politika situacio certe tiam estis kriza, neniuj tamen atendis, ke la “fulmotondro” koncentriĝos tiel rapide, ke nia Esperanto-kongreso eĉ ne okazos. – Multaj samideanoj jam alvenis al la mondourbo, kaj kiam “stelanoj” renkontiĝis, la demando inter ili ĉiam estis. Kion vi opinias rilate al nia kongreso? La plej multaj opiniis, ke certe nia kongreso okazos, sed ke multaj el la 3700 anoj, kiuj aliĝis al la kongreso, estos devigataj resti hejme pro la kriza epoko. La 1-an de aŭgusto, oni ankaŭ malfermis la akceptejon en Garmont Palace; kaj vidante ke oni ornamis la tribunon per kreskantaj floroj, miaj dubemaj antaŭpensoj kvietiĝis, kaj mi ĝojiĝis je la certigo, ke nia kongreso do malfermiĝos la proksiman tagon. Mi nun trairis la belegan konstruaĵon, kun ĝojo imagante ke entuziasmaj esperantistoj

baldaŭ plenigos tian grandiozan halon. Ĉie estis dikaj tapiŝoj por moderigi bruajn paŝojn; ĉio estis vere eleganta. Ankaŭ la vastaj koridoroj estis kovritaj per molaj tapiŝoj kaj provizitaj je salkseĝoj; tie-ĉi oni bonege povus ĝui la konversacion kun amikoj el fremdaj landoj! Certe neniu alia kongreso kapablas prezenti al siaj anoj tiel elegantan, grandiozan kaj tamen komfortan kunvenejon. Ĉio estis harmonia! Orientiĝante mi trarigardis la programon. Kiel zorgeme oni aranĝis ĉion! Mian veran komplimenton al la kongresa komitato! Oni komprenis, ke oni estos “en bona societo”; devus esti ĉarmaj tagoj, kiujn ni travivos!

Sed tute alie ĉio okazis! Kiam posttagmeze mi forlasis la subteran fervojon



(la metroo) por iri al mia hotelo, mi observes starante ĉe la elirejo de l`metroo militiston kun bajoneto sur la pafilo. Nun mi komprenis, ke la malfeliĉa situacio, kiun ni estis kredinta, ke oni povus deturni, nun estas veninta kun terura potenco. Nun ni ankaŭ rimarkis afiŝojn, kioj anoncis ĝeneralan mobilizadon, kaj alian afiŝon, kiu donis informojn al la fremduloj, kiuj estas en Francujo. Dum vespero ĉiuj veturiloj ĉesis veturi; sed ĉar ni tiun vesperon atendis niajn amikojn el Danlando, ni iris al “Gare du Nord” pensante ke eble ili

povos alveni per la vagonaro. En la stratoj ni rimarkis multajn homojn, kiuj iris al la stacidomo prenante siajn kofrojn. Sed alvenante al la stacidomo, mi observis ke ĝi estas fermita kaj okupita de la militistoj.

Malfrue – eble neniam - mi forgesos mian unuan impreson de la ĝenerala mobilizado kaj la malfeliĉulojn – malriĉaj hebreoj, poloj kaj rusoj supozeble – kiuj sidis sur siaj malriĉaj posedaĵoj, pretaj forlasi Parizon, se ili nur sukcesus. Kiam ni petis permeson iri en la stacidomon por akcepti niajn samideanojn, oni respondis ke neniu vagonaro plu transiros la landlimon. Ni tiam hejmeniris, kaj dum la sama nokto ni preparis niajn kofrojn, por ke ni povu vojaĝi la proksiman tagon, la dimanĉon. Sed unue ni intencis viziti la danan konsulon, kaj li diris al ni, ke estus absolute nekonsilinde tuj forlasi Parizon, ĉar multaj personoj jam amase alkuris al la landlimoj, kaj la vagonaroj ne funkcios plu. Ni do decidis resti. Nun ni – kiel ĉiuj fremlandanoj – devis ekhavi nian “permis de séjour”; pasis tri tagoj. Provizitaj de la konsulo per pasporto, kiu estis subskribota de la hotelestro kaj de la polickomisaro, ni iris al la prefekto por ricevi nian permeson de restado. La kontoroj, al kiu miaj tri kunvojaĝantinoj kaj mi devis iri, provizore estis aranĝita en lernejo, kiu staras en mallarĝa strato. Tie-ĉi staris homoj centope el ĉiuj nacioj, eŭropanoj kaj homoj el aliaj mondopartoj; ni staris sur la trotuaro ekster la lernejo sen sufiĉaj kontrolistoj. En la prefektejo oni laboris treege malrapide, kaj post 6 horoj ni nur avancis mallonge, tiam unu el la danaj sinjorinoj svenis; kaj dum bonfaremaj homoj sur la alia flanko de la strato helpis ŝin, mi iris al la konsulo por rakonti al li, kiel malfeliĉaj ni estas. Mi demandis kio povus okazi, se ni ne ricevus la permeson de restado, kaj li respondis, ke estas absolute necese, ke ni ĝin havu, ĉar se ne, estus neeble por ni forlasi la landon, kaj oni eĉ volos aresti nin. Nu, ni do la proksiman matenon de la 6-a horo laŭvice atendadis; tiun ĉi tagon la kontoro translokiĝis al pli freŝa strato, sed ankaŭ tie ĉi estis nur tre malmultaj kontrolistoj kaj centoj da fremduloj; ankaŭ tie ĉi nur treege malrapide oni avancis.

La tutan tagon ni staris sur la strato kaj batalis por eviti, ke aliaj pli fortaj personoj nin malantaŭenpuŝu; sed ni tute ne sukcesis, eĉ se ni estis starintaj 11 horojn en la strato. La proksiman matenon je la 6-a horo ni ree estis ĉe la kontoro; sed tiam jam staris centoj da homoj, kaj kvankam sufiĉaj kontrolistoj ĉeestis tiun tagon, ni komprenis – laŭ niaj spertoj de la

aliaj tagoj – ke ni ne sukcesus ekhavi nian permeson de restado, eĉ se ni starus la tutan tagon. Ni “kapitulacis” kaj iris al la konsulo klarigante al li, ke ni ne plu intencas laŭvice atendadi, eĉ se oni nin arestus aŭ pafus. La konsulo konfesis, ke persone li vidis kiel maloportune la afero estis aranĝita, kaj ke oni nun komprenas, ke estus neeble aranĝi la aferon tiel, kiel oni unue postulis; nun ni nur bezonas nian pasporton kun la subskribo de la polickomisaro. Ni do tute senutile travivis du vere malagrablajn tagojn en Parizo.

Ankaŭ alimaniere – sed tute kompreneble – ni spertis la mobilizadon: estis treege malsufiĉa limigita veturado de l’metroo, neniu varma akvo en la hoteloj, la prezoj en la restoracioj plialtiĝis, ni ne ricevis buteron kaj nur iomete sukron. Telegramojn oni devis france formuli kaj ĉe la polickomisaro ricevi permeson ili forsendi. Telefone nur estis permesate paroli france; unu tagon, kiam ni telefonis al la dana konsulejo kaj parolis dane, la centralo postulis: Bonvolu paroli france. Oni povis interŝanĝi monon, sed ankaŭ por atingi tion, oni estis devigataj stari en la strato. Dana esperantisto atendis 5 horojn en la strato! Se oni intencis vojaĝi per la fervojo oni ankaŭ dum horoj atendadis en la strato kaj tiam ricevis numeron, per kiu oni la proksiman tagon havis la rajton aĉeti fervoj-biletojn.

Dume ni renkontiĝis kun aliaj danaj samideanoj, kaj nia malgranda kolonio, entute 9 anoj, ekloĝis en la sama hotelo, kie ni vivis prudente ŝparemaj, ĉar ni ne sciis, kiom longe ni estos devigataj resti en Parizo. Cetero ni pasigis la tagojn kun longaj promenadoj, kaj unu aŭ du fojojn ĉiutage ni faris viziton en la dana konsulejo, por demandi ĉu estus eble por ni vojaĝi, kaj iom post iom ni estis iomete senpaciencaj. Fine la konsulo opiniis, ke la tempo estas oportuna por nia hejmveturado, kaj ni forlasis Parizon nokte inter la 13-a kaj la 14-a de aŭgusto. Ni estis provizitaj per multaj skribaĵoj, i.a. de la dana kaj la angla konsuloj en Parizo, kaj post tre laciga kaj malrapida vojaĝo ni alvenis al Boulogne sur Mer. Ni iris al la vaporŝipo, kiu veturus al Folkstone en Anglujo, sed oni anoncis ke niaj pasportoj estos esplorataj de la prefekto. Nun ni rapide marŝis ĝis lia kontoro, sed ĝuste kiam ni alvenis al la pordego, la prefekto forlasis la prefektejon aŭtomobile; kaj la kontoron oni fermis ĝis post la forvojaĝo de la ŝipo! Oni konsilis nin atendi ĝis la venonta tago aŭ provi, ĉu oni donus

al ni permeson vojaĝi per la ŝipo, kvankam la prefekto ne esploris niajn pasportojn. Nun ni rapidegis al la ŝipo, kie oni aprobis niajn pasportojn. Per la vagonaro ni veturis al Londono kie nia dana ĝeneralkonsulo aranĝis nian vojaĝon tra Leith en Skotlando, longa malrekta vojo. Per dana ŝipo ni forvojaĝus de Leith, kie ni denove devis havi skriban permeson de la dana ĝeneralkonsulo vojaĝi per la dana ŝipo. Por la lasta fojo ni ree estis skribataj en ŝiplisto. Vespere la ŝipo "A.P. Bernstorff" levis la ankrojn, kaj post unu kaj duon-tagnokta ŝipvojaĝo ni alvenis al Esbjerg. Tiu ĉi parto de la vojaĝo estis ĉiumaniere bonega, kaj ni admiris, ke DFDS dum tiu danĝera epoko lasas sian novan kaj treege belan ŝipon prizorgi la iradon inter Danlando kaj Skotlando.

Merkredon la 19a de aŭgusto ni ree metis niajn piedojn sur dana tero en Esbjerg, kaj ni estis dankemaj revidi nian patrolandon.

Kvankan nia vojaĝo estis vere interesa, esperteble neniam plu Esperanto-kongresvojaĝontoj travivos tian epizodon kiel la nunan.

Astrid Ryboe

Jubileo en Helsingborgo



Ĉi-jare Klubo Esperantista de Helsingborgo fariĝos 80-jara. Ni tion celebros per festa manĝo kaj distraĵoj sabate la 8-an de marto, ĝuste en la sama dato kiam fondiĝis la klubo en la jaro 1934.

Ni volas inviti vin ĉiujn al nia festo la 8-an de marto je la 16-a horo en la festloko en Ättekullagatan 6. Ĝi situas ĉe la fina haltejo de buslinioj 1 kaj 2. (Prefere elektu linion 2. Ĝi estas pli mallonga je kelkaj minutoj.) Peter kuiras festan bufedon kaj Anna Burenus el La Perdita Generacio kantos. Eble ankaŭ vi povus kontribui per iu programero.

La bufedo kun ne-alkohola trinkaĵo kostos SEK100 kaj ni pretas oferti vinon kontraŭ eta krompago. Bonvolu anonci vian partoprenon plejlaste la 3-an de marto al annlouiseakerlund@gmail.com aŭ 0736-17 01 23.

Bonvenon!

Ann-Louise Åkerlund
Prezidanto

DEA-jarkunveno 26-27 de aprilo

La programo de nia jarkunveno estas kunmetita en ĉi tiu numero de la revuo. Vi tie havos la ŝancon renkonti du eminentajn prelegantojn. Jen kiel ili prezentas sin mem:



Ulrich Lins naskiĝis en Bonn en 1943. Kun sia (japana) edzino li havas unu filinon kaj unu filon. Studis historion, politikan sciencon kaj japanologion en la Universitatoj de Köln kaj Bonn. En 1971/72 gast-esploranto en la Ekonomia Fakultato de la Universitato de Tokio. Doktoriĝis per tezo pri la radikala naciismo en Japanio; la tezo aperis libroforme en 1976.

Sian profesian vivon li pasigis plejparte ĉe Deutscher Akademischer Austauschdienst (DAAD), organizaĵo en Bonn, kiu prizorgas la interŝanĝon de universitatoj inter Germanio kaj eksterlando; kelkajn jarojn li laboris por ĝi en Tokio.

Eklernis Esperanton en 1958. De 1989 ĝis 1995 li estis vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Li verkis aŭ kunredaktis plurajn librojn en la germana, japana kaj Esperanto, krome verkis artikolojn en la germana, angla kaj Esperanto. De lia verko *La danĝera lingvo* (1988) ĝis nun aperis eldonoj en Esperanto, la germana, itala, japana, korea, litova kaj rusa.



Mirejo Grosjean naskiĝis en La Chaux-de-Fonds; ŝi devenas el fama pentrista familio de Léopold Robert. Ŝi studis la francan lingvon, la germanan lingvon, geografion kaj historion en la universitato de Neŭŝatelo. Ŝi estas instruistino de fremdaj lingvoj, specialisto pri interkultura edukado, Ŝi estas kunprezidanto ankaŭ de la Asocio de svisaj edukistoj pri la paco: Association suisse des Educateurs à la Paix.

Ŝi sin prezentas jene: senrita emerito, senbrutara nomado, babilema poligloto, parolas 6,2 lingvojn, tre aktivas en nia movado kiel membro aŭ estrarano de pluraj fakaj organizoj. De 2013 prezidanto de ILEI.

Kopenhagaj okazontaĵoj

Ĉiuj kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo. – Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk.

10/2 **Estonio - najbara lando, nekonata lando**

Jan kaj Lene Niemann vizitis dum du brilaj someraj semajnoj la belan, nevenkeblan landon je la rando de Eŭropo. Fieras la homoj pri sia lando kaj ties historio kaj kulturo – 'Ni batalis por la libereco kaj gajnis la liberecon', ili diras. Per multaj fotoj kaj rakontoj ni invitas vin kuniri por kultura, natura kaj nelaste interhoma restado en lando, kiu en multaj sencoj similas al Danio.

17/2 (Ne estos programo pro la vintra ferio)

24/2 Betty Chatterjee kunportante Konversacian Vortaron instigos al vi postmodernigi laŭ via gusto kelkajn el la difinoj: “Ĉu vi scias la diferencojn inter la vortoj amanto, aminto kaj amonto? Nu, ni foliumu Konversacian Vortaron de Andreo Cseh. Laŭ tiu, amanto estas viro kiu aĉetas multajn florojn, ĉokoladojn kaj ringon, aminto estas viro, kiu ĵetas leterojn kaj portretojn en la fornon kaj amonto estas sinjoro, kiu aŭ serĉas adresojn de riĉaj patroj aŭ iu, kiu lernas Esperanton, ĉar Esperanto estas la ŝlosilo de bonaj koroj. – Tiu vortaro estas kolekto de difinoj, kiujn la lernantoj mem proponis, kiam oni demandis, kio estas la signifo de vorto. Multaj el la difinoj estas spritaj, tamen Andreo Cseh eldonis la vortaron en la jaro 1930. Post 84 jaroj, ĉu ni ankoraŭ konsentas pri la difinoj, kiujn ili proponis?”

3/3 **Negro iĝis nigrulo**

<http://www.esperanto.be/fel/2006/008905.php>

Evidenta bazo por diskutoj pri rasismo. N.B. Ĉiuj estas bonvenaj. Tiuj kiuj ne havas la tekston ricevas ĝin surloke.

10/3 Ni aŭskultos la DVD-n **Aleksander Puŝkin: “La neĝa blovado”**.


Tradukita el rusa de Antoni Grabovski, unu el la unuaj esperantistoj, legita de Stano Marček.

17/3 Ana Røssum faros kvizon.

24/3 Ĝenerala kunveno de KEK.

31/3 Peter Wraae montros fotojn de sia vojaĝo en Ĉinio kaj Nepalo.

Miaj Pensoj pri la Lingvo Esperanto



Se ni esperantistoj kelkajn minutojn pripensas nian propran infanaĝon: Ni ĉiuj eklernis niajn patrinan lingvon dum 2-3 unuaj jaroj kaj poste iomete plibonigis ĝin en niaj lernejoj. Oni estis feliĉa ke la tasko finiĝis kaj ke oni pere de ĝi povas eltrovi niajn vivvojojn. Tion kion mi volas diri estas ke ni por laŭta koncentriĝo pri nia lingvo Esperanto kaj ĝia aŭtoro forgesis pri nia ĉefa

tasko. Tio estas uzi la lingvon Esperantog por helpi la alian. Tio estas nia ĉefa celo.

“Kie estas volo estas vojo”, diris la saĝuloj.

Unuigi la homaron tutmonde ne okazos ĝis ni esperantistoj unuigos nin mem, kunlaborante kaj nepre ne alimaniere. Nur kiam ni pripensos kaj planos nian celon, ni povas komenci agi, tiucele.

Mi havas la impreson ke ni fiksis malĝustan kodon en niaj cerboj, ke Esperanto estas politike neŭtrala kaj ke ni en tia situacio devas silenti por ne riski ofendi iun. Estas vero ke ni estas neregistara movado, submetita en la grupo Kulturo, kaj kompreneble ni devas koni la ludregulojn, kaj agi laŭ tio. Oni devas tion esplori kaj adapti al la nuna mondsituacio.

Ni estas materie malriĉa movado, sed ni devas montri al la vasta mondo, ke ni havas mondan superrigardon kaj kulturan kapablon por bonintence kontribui por plibonigi la vivkondiĉojn sur nia planedo. Pripensu, esti videbla, esti fiera, kia bona penso, ĉu ne?

Ekzistas organizoj, kiuj estas kontraŭ milito, ekspluatado kaj maljusteco, kvankam ili apartenas al la malplimulto. Helpo iom pligrandiĝas sed ankoraŭ estas malgranda guto en la oceano.

Mi provos traduki kelkajn eldirojn de profesoro Steen Hildebrant ĉe la Universitato de Aarhus, el la Business-kroniko de Berlingske la 19-an de Januaro 2014. La titolo estas *Kresko kaj daŭripoveco: ŝanĝo de pensmaniero kaj novaj eblecoj*. Li skribis libron kun tiu sama titolo.

Li protestas ke oni daŭre, eĉ en la novjara parolado, parolis pri pli da produktado kaj forgesas doni pri tio la klarigon, kial? Laŭ li estas pluraj formoj de ekonomia kresko kaj samtempe pluraj formoj de daŭripoveco. Tiuj du, li diras, estas konektitaj kaj ne povas neglekti unu la alian, male ili dependas unu de la alia.

En lia libro oni povas trovi multajn bonajn kaj utilajn temojn, pri kiuj ni povus lerni ion. Ankaŭ la demando pri daŭripoveco kaj pli da produktado estas interesa temo kiun ni povus diskuti.

Mi volas menscii lian klarigon, ke la daŭripoveco temas pri respekto al la vivo sur nia planedo, kion ni ĉiam devas havi en nian memoro, kiam ni decidus pri io. Do temas, entute pri homa sciigo, kaj konsciigo.

Ana Røssum

Unuigi la Homaron Tutmonde

Mi kune kun Zita kaj Ole Blaust partoprenis la 21-an Kulturaran Aranĝon okazintan 5-12. de oktobro 2013 en Lloret de Mar, Hispanio.

Krom turismi kaj ĝui la belan veteron mi konsciigis pri io kion mi ne pripensis antaŭe. En niaj ĝisnuna statuto, kiel celo de Esperantismo estas la strebo disvolvi la lingvon, Esperanto. En ordo, sed kion ni volas kun ĝi? Tion ni ne diras.

Mi dirus ke ni strebas labori por Unuigi la Homaron Tutmonde. Ĉu estas utopio? Ne, ĉar la mondo neniam antaŭe estis materie kaj teknike tiel riĉa sed ankaŭ tiel malcerta pri ĉio.

La angla lingvo sukcese helpis pri tia evoluo kaj la mondo fariĝas pli kaj pli malgranda. Tamen eĉ ke la eblecoj por multaj homoj dise la mondo estas multaj, restas plejmulto de la homaro kiu devas vivi en mizero kaj malcerteco pri sia ekzistado.

Multaj organizoj volas kaj helpas dise en la mondo, sed tio nek sufiĉas nek

sufiĉos se oni ne ŝangos unue la pensmanieron kaj tiam ankaŭ la strukturon de la helporganizoj.

Estas buŝoplana tasko kaj longa procezo. Multaj vojoj kondukas al Romo, oni ja kutimas diri. Mi scias ke oni ne povas kaj ankaŭ ne rajtas perforte trudi al aliaj homoj siajn bonajn ideojn, sed mi scias ke ni esperantistoj devas konsciiĝi pri nia tasko. Estas inde paroli pri nia estonteco, sed samtempe pripensi kaj agi laŭ sia propra opinio. Tamen ni povas inspiri unu la alian. Unue estas konsciiĝo, studo kaj klopodo eltrovi por si mem la sencon esti esperantisto. Estas vero ke sufiĉas koni kaj paroli Esperanton por esti esperantisto. Oni povas uzi Esperanton diversmaniere kaj tio estas propra decido de homoj.

Ne eblas ke per iu nacia lingvo oni povas reunigi la homaron, tute simple pro tio ke la nacioj konkurencas kaj pro la egoismaj interesoj ne sufiĉe alte taksas la taskon helpi unu la alian. Ni do ne timu ke iu alia organizo prenos la taskon kiu koncernas nian Movadon.

Nun estas la demando, ĉu ni volas konsciiĝi, maturiĝi kaj trovi la volon por okupi nin pri niaj taskoj. Ni ne havas monon kaj multaj aferoj dependas de tio. Jen defio; estas kaj estos multaj aliaj defioj sur nia vojo sed ni ne rezignu, ĉar lastinstance la tasko estas nia kaj nur nia. Ni bezonas saĝon kaj volon por esti parto kiu ne ignoras, sed klare vidas la bezonojn de la hodiaŭa mondo. Kiam ni eltrovos nian plej bonan agvojon ni verŝajne ankaŭ trovos monsubvencion por realigi niajn agojn.

Karaj samideanoj! Jes, mi iomete provokas vin sed mi nur ŝatus esprimi miajn sentojn de devo kaj mi esperas ke ni kune povas eltrovi nian plej bonan vojon.

Amikan saluton kaj bonan novan jaron,

Ana Røssum

Komento de la redaktoro

De nia flanko ni tre ŝatas kiam la membraro trovas emon kaj tempon esprimi sian opinion en Esperanto en Danio. Sed okaze de la ĉi-supraj kontribuoj ekŝajnis al mi ke necesas aldoni replikon.



Ĉu Esperanto hodiaŭ estas sukceso aŭ fiasko? Nu, tio ja dependas de tio kun kio oni komparas. Se ni rigardas internen, laŭ la bona konsilo de Zamenhof, la dana parto de la organizita movado aspektas mizera kompare al la pasinteco. Aliflanke neniam estis tiom da denaskaj esperantistoj kiel hodiaŭ; kaj ĝuste la ekesto de grupo de homoj kiuj tutvive identigas sin kun la lingvo estas, denove laŭ Zamenhof, la plej bona garantio de ĝia pluvivo. Interne do estas indikoj en ambaŭ direktoj.

Multe pli unusence estas se ni rigardas la minacon ke iu lingvoprojekto transprenus la pozicion de Esperanto. Tiu risko estas absolute nula. En la mondo la suma aktiveco pri Ido, Interlingua, Lojban, Tokipona ktp. estas eble unu procento – 1%! – de tiu pri Esperanto, kaj la aktivuloj grandparte estas esperantistoj hobiantaj pri la aliaj planlingvoj pro historia intereso aŭ kuriozemo. Do tiurilate la Fina Venko fakte delonge estas atingita.

Tamen, unu afero estas ke Esperanto venkis kiel neŭtrala, internacia lingvo; sed, demandas la publiko, ĉu tia elpensita lingvo vere estas lingvo? Kio entute *estas* lingvo? Por kleriĝi pri tia speciala afero, oni turnas sin al la speciala scienco, do ĉi-okaze la lingvistiko. Sed montriĝas ke *la lingvistiko estas la sola scienco kiu neniam havis sian finan venkon!* Se oni komparu la medion de lingvistiko kun tiu de la internacia lingvo, tiam estas kvazaŭ Volapuko ankoraŭ estus grava lingvo, Esperanto kaj Interlingua estus pli-malpli samrangaj, kaj ĉiun duan jaron aperus nova Ido postulanta atenton. Sed la sciencoj havas prestiĝon en la socio, kaj tiam oni ne atentis kiam unu el ili estas fiasko!

Tiu fiasko tamen estas ankaŭ nia fiasko, ĉar se oni ne povas preni lingvistikon serioze, tiam oni ne povas diri ion seriozan pri ĝia temo. Kaj se oni ne povas diri ion seriozan pri lingvo – *tiam ankaŭ pri Esperanto oni nenion seriozan povas diri!* Tiel simple kaj tiel malfacile estas. Mi ne scias kiel organizi solvon de tiu problemo, sed unu afero estas certa: ni neniam eksolvos ĝin se ni pretendas ke ĝi ne ekzistas.

Alvoko pro la Internacia Virina Tago 2014

Mesaĝo por la Internacia Virina Tago 2014, Hirosima

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo,

Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2014 Hirosima, konsistas el 23 organizoj kaj la municipo Hirosima, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 2-a de marto, 2014, por la Internacia Virina Tago de UN en la 8-a de marto, ni havos kunvenon por kunlaboro per saĝoj kaj fortoj, kaj antaŭenpuŝi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.

Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hirosima organizas kunlaborojn por heredigo de la socio paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antaŭenpuŝo de komuna partopreno de geviroj.

“ Pasis tri jaroj ekde la katastrofo de la unua atomcentralo de Fukuŝimo administrata de Tokia Elektropova Kompanio (TEPCO). En kia situacio la infanoj en Fukuŝimo vivas post la katastrofo...?” estas la ĉefa temo de la Tago 2014, kaj ni pripensas pri nutraĵo kaj estonteco por la infanoj.

La registaro diris ke “La malpurigo pro radioaktivaj substancoj ellasitaj de la akcidento de atomcentralo kaŭzis la plej seriozajn kaj malbonajn problemojn el ĉiuj malpurigoj de la medio”. Kaj ankoraŭ nun la infanoj en Fukuŝimo ne povas ludi libere eksterdome. Ili vivas kun timo kio estas tuŝebla, mangxebla, kaj eĉ spirebla.... Kaj, pli granda timo estas interna alradiado.

Ni respondecas certigi riĉan kaj sekuran estontecon por la infanoj. Okaze de la Virina Tago ni pripensas kiel agadi por estonteco de niaj infanoj.

Bonvolu doni vian opinion kian estontecon ni transdonu al la infanoj, ni petas. Vian mesaĝon ni ekspozicios en du kunvenejoj de la urbo.

S-ino YOSIDA Mariko

*Prezidanto de la plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2014,
Hirosima*

La municipo Hirosima

Jen du danaj respondoj:

Nome de la Dana Esperanto-Asocio mi esprimas nian profundan kompaton pri la gravegaj akcidentoj kiuj okazis en Fukushima. Dekomence kaj daŭre ni estis ege bone informitaj pere de la precizaj informoj de s-ro Hori Jasuo, kies enhavo tre kortuŝis nin. Jes, estas terure kio okazis en Fukushima, kaj eĉ pli nekompreneble estas la fakto, ke via registraro tamen intencas daŭrigi produkti elektran forton pere de la ekzistantaj atomcentraloj.

Kiam la homaro lernos de siaj eraroj? Ĉu vere la sorto de la junaj generacioj ne interesas la politikistojn? Des pli forte kaj kuraĝe ni ĉiuj devas agi por defendi la bazan postulon de la civitanoj; la rajto ekzisti kaj vivi en paco sur tiu ĉi belega planedo.

Ne tute vane la temo de nia 99-a Universala Kongreso kiu okazos ĉi-somere en Argentino estas: ĉu la nepoj nin benos? La celo de nia movado estas kontribui al daŭripova estonteco kaj Esperanto estas lingvo por daŭripova mondo. Tial ni forte kondamnas ĉiujn fortojn kiuj malebligas tiun celon, kaj forte apogas ĉiujn homojn kiuj kontribuas al paca kunekzistado.

*Ileana Schröder
Prezidanto de Dana Esperanto-Asocio*

Estimataj kaj karaj gesinjoroj en Hiroŝimo,

Mi sincere dankas al vi pro la alvoko okaze de Internacia Virina Tago 2014.

Neniuj nuntempuloj en riĉaj landoj povas aserti ke ili ne povas ekscii pri la travivaĵoj de homoj loĝantaj en aliaj landoj. Televidile kaj komputile, ĉiu kiu emas informiĝi, bone konscias pri la ĉiutagaj katastrofoj suferataj de aliaj homoj eĉ en la plej malproksima lando. Ŝaltante la televidilon aŭ komputilon ni spektas la ĥaoson post naturkatastrofo kaj ni aŭskultas la diraĵojn de senesperaj gepatroj; malŝaltante la televidilon ni eskapas. Tamen la suferantoj ne ĉiam eskapas.

Pro tio ni neniam forgesu la sorton de viaj samlandanoj loĝantaj en Fukuŝimo, kiuj suferadas pro la silenta minaco de nukleaj malpuraĵoj. Mi vere kompatas la infanojn, kiuj ne povas libere ludi eksterdome pro la sanminaco. Plue la ĉiutaga elekto de ne malpurigitaj manĝaĵoj certe ankaŭ

estas grandega defio por ĉiuj loĝantoj. Mi elkore esperas, ke per via venontjara mesaĝo vi povos informi al ni pri granda pliboniĝo de la vivkondiĉoj en Fukuŝimo.

Malfacile estas resti optimisto en la nuntempa mondo: la antaŭjuĝemo, la malegaleco, la suspektemo, la malamo, la malavaro ĉie minacadas ĉies pacon. La teruraj militoj, kiuj furiozas en Sirio, Centrafrika Respubliko, Sudano kaj la maltrankvilaĵoj en multaj aliaj landoj signifas, ke multaj fariĝas rifuĝintoj. Laŭ UNHCR troviĝas en la mondo 15,4 milionoj da rifuĝintoj (fine de la jaro 2012). Lastjare potage fuĝis 23 000 homoj de siaj hejmoj pro militoj kaj persekutado. Rifuĝintaj infanoj ne vizitadas lernejon, ili ofte malsaniĝas pro manko de pura akvo kaj de manĝaĵoj: oni nomas tiajn infanojn la perdita generacio.

Kvankam oni ne povas malhelpi la okazon de naturkatastrofoj, oni povas kaj devas eviti militojn kaj persekutadojn, ĉar ili estas homfaritaj. La paca problemsolvado estas lernebla se nur ekzistas la emo.

Mi deziras al vi grandan sukceson kaj feliĉon. Venontjare mi esperas, ke mi povu skribi pli optimisman mesaĝon.

Amike

Betty Chatterjee (Danio)

Grandioza reklamo por Esperanto

Seppersona Esperanto-delegacio el Herzberg – la Esperanto-urbo partoprenis en januaro la grandegan prezentaĵon “Esperanto – Piroteknika Turneo 2014” en Braunschweig. De kelkaj semajnoj konstante pri tio informis la gazetaro, oni varbis per multaj radiostacioj por la “Esperanto-turneo 2014” kaj ofte oni skribis pri la “agnoskita mondlingvo Esperanto” kaj “lingvo de la estonteco”. La turneon kreis la firmao TUI kune kun NTB (la Gimnastika Asocio de Malsupra Saksio).

La du oble trihora prezentaĵo okazis en la granda “Volkswagen-Halle” kun po 10.000 spektantoj. La “titola kanto” fakte estas la Esperanto-himno, sed en moderna kaj alloga komponformo. Ankaŭ eblis aĉeti modernajn trikolorajn T-ĉemizojn kun la teksto “Esperanto-Turneo 2014”. Ĉie pendis

grandaj varbafiŝoj kaj la programkajerojn enhavis multajn informojn pri la Esperanto-filozofio kaj la tekston de la Esperanto-himno kun germana traduko.



Pli favorajn vortojn kaj frazojn pri Esperanto la movado mem ne povus formuli. Dum la komenco oni informis per laŭparoliloj, kial la nunjara temo (slogano) estas Esperanto. Same la prezidantino de la Gimnastika Ligo en Malsupra Saksio (Niedersächsischer Turnerbund) laŭdis publike la ideon kaj la oficialan lingvon

Esperanto. La juna talenta kantistino Olivia Irmengard Grassner el Hanovro detale klarigis, kial ŝi ŝatas Esperanton, kial ŝi kune kun Fabian Sievers novkomponis la Esperanto-himnon (titola kanto /Titelsong), kial ŝi kantas en la lingvo Esperanto kaj ke Esperanto estas la nova internacia “teamsento”, kiu etosigas ĉiujn partoprenantojn.

Fragmento de la kanto troviĝas rete: <http://vimeo.com/83774499>

Certe milionoj aŭdis kaj legis eĉ plurfoje (tre pozitive) pri Esperanto kaj pli ol 200 000 vizitintoj en multaj germanaj urboj mem aŭdis kaj spertis tre pozitive pri Esperanto. Elstara reklamo! Ofta ripetado efikas, kaj ankaŭ en Herzberg oni rimarkis ke novaj interesiĝantoj petas informojn pri Esperanto kaj pri la tieaj lingvokursoj.



[laŭ Eŭropa Bulteno]



ESPERANTO-
TAGO

2014

Lingva justeco

26a julio 2014

↪ Ellernu Esperanton: www.lernu.net